ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 11 [1994/5] — Septembro-Oktobro 1994

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ 096 46 1389.
Presfuŝisto: Odlo Bokserp. Adreso ĉe la redakcio.
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Intervjuo: Max Wearing kun Atilio Orellana Rojas 4
Sep semajnoj en Adelajdo (Marc Noulin) 6
La 79-a Universala Kongreso en Koreo (Shirley Gradussov) 7
(Parto de) Kopenhago tra la okuloj de noktogardisto (Bob Felby) 12
Radio 3ZZZ (Svetislav Kanaĉki) 15
Samarkand 16
Lingva Angulo (Alan Towsey) 17
Diversaĵoj 25

Recenzoj:

La Plej Granda Fenestro de Kiril P. Popov (rec. Donald Broadribb) 20
Pri Tipa Esperantisto, Esperanto-lingvano kaj Handikapoj de Aleksandro Melnikov (rec. Vera Payne) 21
La Fremdulo de Albert Camus (rec. Donald Broadribb) 23
Teorio kaj Praktiko de Lingvo-instruado de Irena Szanser (rec. Donald Broadribb) 24

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi viajn verkojn al ni tajpitajn aŭ sur 3½-colaj diskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto, bonvolu kunsendi afrankitan taŭgan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. La redaktoro rajtas konformigi la artikolojn al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone artikolo povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj aŭ de la redakcio.

Absoluta limdato por ricevo de kontribuoj por la venonta numero: 26 Oktobro.

LA 82-A
UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
EN ADELAJDO
19-26 Julio 1997





Laŭ informo sendita de nia prezidanto Kep Enderby kaj nia vicprezidanto Vera Payne, la Komitato de UEA oficiale akceptis okazigi la UK-on de 1997 en Adelajdo, kaj petis la estraron de AEA establi landan kongresan komitaton por aranĝi la detalojn.

NOVA ADRESO DE ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

La redakcio de *Esperanto sub la Suda Kruco* nun havas la adreson:

Donald Broadribb
59B Lukin St
Beverley WA 6304
Aŭstralio

La nova telefonnumero estas 096 46 1389. Faksilo ne plu disponeblas al ni.

Bonvolu sendi ĉion por *Esperanto sub la Suda Kruco* nur al tiu nova adreso.

INTERVJUO: MAX WEARING KUN ATILIO ORELLANA ROJAS

La nomo Atilio Orellana Rojas prononciĝas Atiljo Oreĵana Roĥas.

MW: Atiljo, vi antaŭe instruis la rusan lingvon en universitato en Córdoba, sed poste subite ŝanĝis direkton, ekinstruante Esperanton tra la tuta mondo...

AOR: Fakte, Esperanton mi instruas de multe pli antaŭe ol tiam, nome de 1985, kaj eĉ dum la tempo kiam mi instruis la rusan lingvon, treege ofte mi forestis por vojaĝi al aliaj landoj kaj instrui Esperanton. Simple mi kredas ke estas pli interese instrui Esperanton, ĉar tio donas tute alian pensmanieron kaj alian konscion pri internacieco kaj toleremo kaj veran interfratiĝon de la homaro, kio multe pli utilas—almenaŭ laŭ mia vidpunkto.

MW: Kie ĝis nun vi instruis Esperanton?

AOR: En amasego da landoj: en Sud-Ameriko en mia propra lando, Argentino, kompreneble en Brazilo, en Bolivio, en Venezuelo; en Kanado; en Estonio, Norvegio kaj Francio; en Koreo...

MW: Kaj kien vi iros por viaj venontaj instruvojaĝoj?

AOR: Nu, mi devos baldaŭ reiri al Eŭropo por iom labori en la Centra Oficejo de UEA kaj ankaŭ en la internacia Esperanto - Instituto en Hago. Poste mi devos prelegi en Belgio, ankaŭ en Francio. Mi devos instrui en Norvegio, kaj poste mi instruos en Afriko. Tie mi pasigos kelkajn monatojn, ne nur por instrui sed ankaŭ por kunlabori en la organizado de la Tria Afrika Kongreso, kiu okazos en Ganao.

MW: Kaj tuj poste en januaro 1995 vi instruos en la Somerlernejo en Aŭstralio, ĉu ne?, kaj en julio en la Ŝtata Universitato de San Francisko. Ĉu vi ĉiam instruas rektmetode?

AOR: De la tempo kiam mi komencis instruadon de Esperanto, jam de tiam, eĉ sen koni la metodon kiun mi nun aplikas en Esperanto, nome la Cseh-metodon, mi instruas parolante nur Esperanton kun miaj gelernantoj. Je la fino de tiu unua jaro en mia lando, tiam mi malkovris hazarde la Cseh-metodon kaj adoptis ĝin por mi. Tamen ne nur tiel mi instruas, ĉar ĉio dependas de la bezonoj de la gelernantoj.

MW: Kiamaniere vi instruos en Adelajdo en la Somerlernejo?

AOR: Laŭ la planoj estos du grupoj—unu por komencantoj kaj unu por homoj kiuj deziras instrui. En la lastaj du jaroj mi adoptis multege da ludoj kiuj helpas kapti la atenton de la gelernantoj. Do tiujn mi certe uzos en la kurso por komencantoj, sed la kurso por la instruistoj havos alian celon—nome kapabligi ilin en la rektmetoda instruado—tamen ankaŭ kun ili mi uzos ludojn, ĉar per ludoj oni povas ankaŭ lerni pri instruado.

MW: Kiom da homoj ĝis nun vi esperantistigis?

AOR: Al tio estas tute neeble respondi, mi pensas. Jam ĉi tiun

jaron, ekzemple, en Brazilo en Aprilo mi havis 260 gelernantojn. Mi tute ne havas ideon pri kiom da homoj estas. Pasintjare dum la brazila Esperanto-kongreso en São Paulo ĉeestis preskaŭ 700, kaj la pli granda parto de tiuj 700 estis miaj iamaj gelernantoj.

MW: Ĉu vi kredas ke Esperanto havas sufiĉe da libroj, bendoj kaj aliaj iloj?

AOR: Fakte, nuntempe mi opinias ke Esperanto preskaŭ ne kapablas konkuri kun iu ajn lingvo rilate la instruilojn, simple pro tio ke ni havas tre amatorajn. Nuntempe aperas tiu projekto Mazi[1], kiun mi fortege apogas, ĉar la produkto de tiu filmo estos ege utila. En mia propra instruado mi simple "ŝtelas" la lernlilojn por la angla lingvo kaj adaptas ilin al Esperanto—ĉar por instrui la anglan lingvon nun ekzistas belegaj instruiloj—afiŝoj, kasedoj, filmoj, ktp.

MW: Ĉu vi havas impreson pri tiu alia instrufilmo kiun preparas la usonanoj?

AOR: Bedaŭrinde ne, ĉar mi tute ne konas ĝin. Pri *Mazi en Gondolando* mi ja povas paroli, ĉar mi eĉ vidis ĝin, trafoliumis la lernolibrojn, kaj ĉion mi kontrolis. Ĝi estas bona projekto. ❑

[1]Pri ĉi tiu projektata filmo vidu la anoncon en *ESK* 10 (julio-aŭgusto 1994) p.23.



Atilio Orellana Rojas

Mondvojaĝanta Cseh-metoda Esperanto-instruisto Atilio Orellana Rojas dum la Universala Kongreso en Seulo. La fono?—Rivero Han, poluo kaj konstruaĵoj de la urbego. Fotis Max Wearing.

SEP SEMAJNOJ EN ADELAJDO

DE MARC NOULIN

Jen kiel spertis la Somerlernejon en Adelajdo franca partoprenanto.
Danielle kaj Marc Noulin vizitis Aŭstralion por partopreni en la Somerlernejo / Kongreso de AEA en Adelajdo en Januaro 1994



Alveni en Adelajdo estas malfacile atingebla celo. Qantas anoncis 26-horan vojaĝdaŭron, sed anstataŭ fari rapidan, rektan flugon al la Sud-aŭstralia ĉefurbo nia flugmaŝino vagadis, limakis kaj promenigis nin tra Melburnon kaj Sidnejon. Certe la aerkompanio deziris montri al ni la incendion kiu estis minacanta Sidnejon. Post vojaĝo plilongigita je 15 horoj akceptis nin ĉe la Adelajda flughaveno samideanoj kies ĉeesto estis signita per konata flava flago. Komenciĝis malkovro de la antipoda kontinento.

Ĉar niaj enlandaj Esperanto-aranĝoj ĝenerale postulas vojaĝon sur malgrandaj distancoj, ni, eŭropanoj, tute ne konscias pri la problemoj kiujn la aŭstralianoj devas fronti por, almenaŭ unufojon jare, partopreni komunan renkontiĝon: t.e. 2000- 3000-kilometra veturado—eĉ pli. Ĉiuj programeroj okazis en Aquinas Kolegio: kursoj, prelegoj, distraj vesperoj. Same ni tie manĝis kaj dormis. Tio ĉi donis favorajn kondiĉojn por bona disvolviĝo de la dusemajna somerkursaro. Kaj fakte ni banis nin en agrabla etoso. La studprogramo estis riĉa, eĉ foje malfacilan elekton ni devis fari inter allogaj kursoj okazantaj samtempe. Ĉiuj distraj vesperoj estis prizorgataj de la kongresanoj mem, sen ekstera partopreno. Pri la manĝoj ni povas diri ke ili estis bonaj, eĉ por eŭropanoj mise informitaj de malbonintencaj voĉoj. Danielle miris pri sia inklino al la tipa Aŭstralia frandaĵo: la vegemito (Vegemite). Famkonata en la tuta lando estas la Adelajda akvo sed por kiuj ne ĝin gustumas estis proponitaj diversaj likvaĵoj kies nomojn ni kutimas aŭdi en nia hejmregiono: cabernet, sauvignon, riesling, chenin.

La vorto Aŭstralio tuj elvokas kanguruojn sed ĉu tiuj strangaj bestoj estas videblaj alimaniere ol mortaj? Tion oni povintus dubi, nur vidante surstrate mortigitajn specimenojn, eĉ sur Kanguru-Insulo. Tie tamen ĉe la piknikejo venis viva, malsovaĝigita delegito por permesi al ni kunporti bildon en nia fotoaparato. Certe ĝi estis dungita de la loka turismoficejo. Koaloj ne estas bonmoraj bestoj, neniam ili konsentas vekiĝi por saluti altrangajn francajn gastojn. Emuoj, kukaburoj, ibisoj montriĝis pli ĝentilaj. Apud Melburno ĉe Healesville Sanctuary ni konatiĝis kun la plej eksterordinara mamulo, t.e. la ornitorinko.

La Aborigena popolo laŭdire nuntempe ricevas pli da estimo flanke de la registaro. Tamen problemoj postrestas—tion atestas la "ambasadejo" kies starigon la Aborigenoj

faris en Kanbero por montri ke ili sin konsideras kiel eksterlandanojn en lando loĝata de iliaj prapatroj de ĉirkaŭ 40 000 jaroj. Saman impreson de senposedigo ni ricevis rilate al la Aborigena arto. Ĝin oni povas admiri en diversaj muzeoj kaj butikoj sed ĉiam la deĵorantoj (krom en Adelajdo) aŭ butikposedantoj estas blankuloj. Parto de la enspezoj produktitaj de la altpreze venditaj objektoj iras al la Aborigena komunumo, tio ne forpuŝas la senton de konfiskado de Aborigena arto profite al komercaj celoj.

Restado meze de Esperanto-medio, en alloga lando, jen travivado kiun ni ĝuis kaj kiu plenigis niajn cerbojn per neforgeseblaj impresoj. ❑

LA 79-A UNIVERSALA KONGRESO EN KOREO

DE SHIRLEY GRADUSSOV

Prologo

Ĉu vi scias ke mi labor-"feriis" dum pluraj monatoj ĉe familianoj en diversaj lokoj? Finfine, tamen, mi estis hejme...varma, kvieta, rikostos nenion, via loĝejo estas jam rezervita, kongresaliĝilon oni arangos."

Pripensinde, ĉu ne? Mi promesis retelefoni. Intertempe tremetante mi petis konsilon de nia elstara Esperanto-spertulino. "Vi akceptu," diris ŝi. "Telefonu tuj al la loka ministro pri eksterlandaj aferoj pri pasportebleco. Bonsorton!"

Mi provis. Surbendigita voĉo ripetis: "Estas dimanĉo. Se la afero vere urĝas, vi rajtas voki la ministron en lia privata loĝejo ... numero..."

Miraklo! Ĵaŭdon ĉirkaŭ tagmezo alvenis la du vojaĝantoj, ŝi kaj mi, ĉe la Perth flughaveno, ambaŭ elĉerpitaj, sed pretaj por aventuro.

pozema. La ferivalizon mi eĉ ne malfermintis. Malpuraj vestaĵoj povos atendi ĝis morgaŭ...Neniu saĝulino laboras lavistine dimanĉvespere. Mi enlitiĝos frue. Tiel mi pensantis, kiam la telefono ruze eksonoris.

"Helpu min, karulino. Flugu kun mi venontĵaŭdon al Seulo al la UEA kongreso."

Ĉu ŝi estas freneza? Mi eĉ ne malfermintis leterojn, korespondlecionojn, fakturojn pagendajn, kaj Dio scias kion. Plej grave, mankis al mi pasporto, mono kaj energio. Sed la plorpersvada voĉo ne ĉesis. "Mi jam telefonis vane al pluraj aliaj inoj. Vi estas mia lasta esperradio. Sen helpulino mi ne povas vojaĝi. Vi ja scias ke mi havas 90 jarojn, jam suferis unu apopleksion. Estas terure ke mia ĝisnuna vojaĝkunulino grave ekmalsaniĝis. Konsideru, mi petas...via flugbileto

Koreo...Unuaj Impresoj

Laŭ mia hejmatlaso kaj ties informo, la somero en Koreo devas esti milda, ĉirkaŭ 25°C. Tamen surteriĝinte kaj elirinte la gigantan flughavenon ĉe Seulo mi preskaŭ svenis: estis la plej varmega somero en la veterkronikoj, 99°F [37°C] kaj 99% da humideco. Pakaĵ-pas-

port-enir-dogan-problemoj "venkiĝis"; ni nur bezonis monon kaj taksion. Mono, jes: 660 ŭonoj por aŭstralia dolaro. Enketo pri taksio post rapida kalkulo iomete konsternis: por du homoj ĝis la Sheraton-kongresejo kostos 93 400 ŭonojn, en nia mono $140. Helpema sinjoro sugestis aŭtobuson. Ree al la informbudo: jes, ĉiun horon eliras aŭtobuso rekte al la Sheraton-hotelo. Por unu homo, 8000 ŭonoj. Bonege. Serĉante la ĝustan aŭtobushaltejon mi ekvidis la Esperanto-standardon sur eta vendotablo. "Bonvenon ... el kie ... ho, bonvenon ... jen mapo, kiso ... manpremo." La du dejorantoj, koreanino kaj okcidentaspekta viro, konfirmis la aŭtobuson kaj ĝisis.

Post 90 minutoj en la varmega aŭtobuso kiu helikecis tra densa trafiko, ni alvenis ĉe la Sheraton. Tiom da homamasoj! Sed kion oni atendu en urbego de 13 milionoj je la 8a horo vendredvespere? "Via ĉambro, jes ... pasportoj, jes. Deponantaŭpagon, mi petas, je unu miliono da ŭonoj." Rapida kalkulo, protesto ... sufiĉis 900 000 ŭonoj ... jen la ŝlosilkarto ... portisto akompanos vin al la 9a etaĝo, al via luksa ĉambro.

La kongreso. Sabatmatenon.

Imagu ĉirkaŭ milon el la 1800 kongresanoj en la granda akceptejo. Ili venis el 65 landoj kaj malgraŭ fojfoje iomete strangaj prononcmanieroj parolis Esperanton. Brue jes ja, sed feliĉe! Oni ekvidis konatojn alilandajn (aŭ samlandajn). Salutis babiladis ridis, sed ne perdis sian lokon en la vico antaŭ la budoj. Gejunuloj el Koreo kaj aliaj landoj estris ĝentile kaj pacience la budojn. Oni rekonis ilin per la grandaj satenaj rozetoj. Ĉe la UEA budo oni konfirmis alvenon, pagis monon, ricevis kongresinsignon, kongreslibron, belan sakon, ventumilon. Apude ĉe alia tablo oni prizorgis loĝlokojn. Ĉe malsama budo oni konfirmis ekskursojn kaj vendis la neprajn biletojn. Teretaĝe ankaŭ troviĝis la poŝtoficeja budo kie vendiĝis preskaŭ pogrande poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj. La junularbudo allogis aregon da junuloj, komencantoj ĝis spertuloj. Plejparte azianoj ili estis entuziasmaj, ordemaj, belaspektaj. Kia plezuro! Kaj plezuro estis vidi Jay Grant (el Kvinslando) kiu dejoris ĉe la UEA budo. Ŝi bonvenigis nin kaj afable konsilis ankaŭ. Oni admiru kaj gratulu ĉiujn el la gejunuloj kiuj dejoris en la akceptejo. Estis longa paciencpostula tasko frumatene ĝis vesperfine.

"Via kongreslibro estas via Sankta Biblio," konsilis D-ro Profesoro So Gilsu je la kunveno de unuafojaj kongresanoj. Tre helpaj estis li kaj S-ino Lipari. (Fakte la kongreslibro estas trezoro, enhavanta ĉiujn nomojn, kongresnumerojn, konsilon pri kursoj, laŭtagaj programoj, distraĵoj, ktp. Ĝi ankaŭ prezentas etan historion de Koreo, kune kun fotoj kaj biografioj de elstaraj Esperanto-prelegantoj kaj honoraj gastigantoj.)

Menciinda estas la kongresejo. Pro la daŭra klimatizado, elegantaj grandaj haloj, kaj taŭgaj kunvenĉambroj en ĉiu el la kvar etaĝoj, hotelo Sheraton estis tre kontentiga elekto. Ĝi situas apud la bela rivero Han, for de la urbego kaj ofertas (je prezo) ĉiujn luksojn. Sed kiom da homoj povis toleri la el-

spezon por lukso? La plejmulto loĝis aliloke kaj venis taksie aŭ aŭtobuse frumatene. Multaj pasigis 15 horojn tage en la hotelo, ne antaŭĝuante sendorman nokton en sia propra loĝejo kie moskitoj kaj varmego ĝenis. Kaj manĝaĵo estis kosta afero. Eĉ en la t.n. "Sheraton malmultekosta Esperanto-manĝejo" la vidindaĵo estis belega sed manĝaĵo mezkvalita kaj altpreza. Multaj prenis taksion por iomete butikumi ĉe vilaĝstilaj butikoj. Sed pro la fakto ke oni ne havis kuireblecon, devis aĉeti 2-3 bananojn, unu panon kaj iomete da kolbaso. (Ĉi tiuj okcidentstilaj manĝaĵoj, tre raraj ĉe Koreaj familioj, kompreneble vendiĝis je luksaj prezoj). Nur dum la ekskursoj tuttagaj oni manĝis belajn rizpladojn kaj flankenpladetojn da legomoj (rafanoj trempitaj en brulpipran saŭcon kun iom da pomo kaj unu-du laktukfolioj)—tre satiga manĝaĵo!) Teme manĝaĵon, ankaŭ la bankedo je prezo de preskaŭ $60 ofertis vere malabundajn pladojn. (Ni certe alvenis iomete malfrue, sed la trinkaĵoj escepte de biero estis jam elĉerpitaj ankaŭ.) Ni do estu dankaj pro la abunda malmultekosta manĝaĵo en Aŭstralio. Mi neniam plu plendos pri la kosto de legomoj, frukoj kaj viando ĉe ni. Eble pro la nutraĵkondiĉoj la koreanoj havas belajn sveltajn taliojn eĉ en mezaĝo kaj poste. Ili ne malsatas, kaj ili havas belegajn dentojn kaj fortajn ostarojn, eble pro la naturaj mineraloj en la akvo. Certe la rizo estas grava ĉefmanĝo. Dum la ekskursoj oni atentigis nin ke la rizkreskado malprosperis eĉ malsukcesis pro manko de pluvo. Grava problemo! La prezidento kaj parlamentanoj propravole rezignis pri siaj jarferioj por havigi al terkultivistoj pli da helpmono en la terura krizo. (Ĉu niaj parlamentanoj iam ofertus onon de siaj grandaj salaroj por helpi suferantajn bienistojn?)

Vojaĝante en la urbon per aŭtobuso kaj subteraj trajnoj ni ofte parolis kun studentoj. La anglan ili trovas tre malfacile prononcebla, sed ĝi estas deviga studobjekto kaj ili ĉiuj parolis kaj komprenis iomete. Ankaŭ deviga por junuloj estas trijara soldattrejnado. Eble tial la junuloj kondutis tiel respondece kaj ordeme. Sed ĉie mi trovis la koreanojn tre ĝentilaj kaj helpemaj, sin ĝenantaj bonhumore por gvidi nin al la ĝusta fervoja kajo aŭ iu fora subtera enirejo. (La kongresmapojn kun metrostacioj ĉiuj neesperantistoj komprenis.) Ni serioze demandis nin, ĉu ni povas lerni el la korea edukadsistemo kaj ties filozofio, ĉar la homoj ŝajnis esti disciplinitaj, diligentaj kaj feliĉaj. Ĉu dank' al Konfuceo?

La kongrestemo traktis pri "La rolo de Azio en la mondo" kun subtemo pri paco. Kiel difini tian temon? Lertaj profesoroj kaj prelegantoj prezentis interesajn historiajn kaj filozofiajn aspektojn ĝis la nuntempo. Tiel sukcesaj iĝis kaj iĝas diversaj aziaj landoj (pro diligenteco kaj altnivela studado) ke eble estontece la temo estos "Ĉu estas rolo por nacioj ekster Azio?" Oni ne povas ne gratuli la aziajn najbarojn pro ilia sukceso. Pere de Esperanto oni eble forigos barierojn por paca interkomercado. La amarajn sentojn el la pasinteco oni iomete alfrontis en la kongreso (ekz. inter Koreo kaj Japanio aŭ Ĉinio

kaj Japanio, Usono kaj Japanio). Oni agnoskis la pekojn de sia lando, pardonpetis, promesis honestecon en lernejstudlibroj. La homoj volis kompensi por la hororoj de siaj militantaj nacioj. Pri la kongrestemo kaj "Agado en la mondo" oni tre dankas Profesoron Doktoron Probal Daŝgupto, Profesoron Doktoron So Gilsu kaj nian estimatan Ralph Harry. Ili multe helpis en la diversaj kunvenoj pro ege granda historia kaj ekonomia scipovo (ankaŭ pro diplomataj ĝentilaj sintenoj).

Estas malfacile eĉ mencii la mirindajn programerojn, ĉar ofte okazis samtempe 4 aŭ 5 tre indaj kaj allogaj kunvenoj: konversacirondo, kongrestema laborgrupo, interreligia konferenco, prelego pri Koreo ktp. (Laŭ onidiro mi maltrafis juvelon, nome pri religiaj praktikoj kaj naciaj kulturoj kaj Kompara Religio.)

Merkredon en la kongresejo okazis neniuj programeroj. Estis la tago de ekskursoj — kvin longedaŭraj, ses duontagaj, ĉiuj tre promesplenaj. Mi volis iri al la armistica vilaĝo Panmunjon en la senarmiligita zono inter Norda kaj Suda Koreo, sed ne estis sufiĉe da sidlokoj. Panmunjon estis tre tikla situacio. Kelkmiloj da usonaj soldatoj provizis armitan "paczonon". Oni malpermesis al Koreanoj iri tien, sed fremdaj turistoj kiaj ni rajtis, kondiĉe ke ni nepre kunportu pasportojn, nepre vestu nin dece, hararon kombu dece kaj, se necesis, ordeme ligi. (Oni malpermesis bluĝinzojn, sandalojn kaj neformalajn vestaĵojn.) Plue, oni ne tuŝu ion ajn apartenantan al la norda flanko, kaj oni nepre ne kontaktu nek respondu iel ajn al soldatoj aŭ deĵorantoj de la alia flanko. La homoj kiuj iris al Panmunjon marŝis laŭ balkono de kie ili vidis de tre proksime la aliflankulojn.

Estas dirende ke la UK en Seulo fortimigis kelkajn eblajn kongresanojn, pro la militminaco. Sed la plimulto de kongresanoj eksterlandaj ne vere konsciis pri la problemo. Nur kelkaj loĝantoj en la Sheraton Hotelo sciis ke dum la ekskursoj merkredon stabanoj tie pasigos du horojn farante "civildefendan ekzercadon".


Mi tiutempe ekskursis al la tre interesa tradicia folklora vilaĝo, vera subĉiela historia muzeo, kiu montris la vivmanieron de prapatroj ekde 1392. Oni tie regalis nin per mirinde vervaj buntaj folkdancoj, tre ĝuigaj por ni, ege varmigaj por la dancistoj. Ili certe meritis la laŭdan elkoran aplaŭdon. Post bonega korestila lunĉo ni vizitis ceramikejon kaj ekspozicion de ceramikaĵoj. Kia bela ekskurso! Ni tre dankis kaj gratulis niajn gastigantojn pro bonega ekvido de ilia kulturo.

Je la fino de tiu tago, ĉiuj estis lacaj sed tre kontentaj pro la diversaj ekskursoj. Mi nur bedaŭras ke mi devis reveni en Aŭstralion tuj post la kongreso. Ŝajne la postkongresaj vojaĝoj al Insulo Cheju kaj la kvartaga vizito al oficiala postkongreso en Japanio estis ege ĝuigaj.

Pri distraĵvesperoj kaj la lasta grandioza adiaŭkoncerto, ankaŭ pupteatro, filmoj, kaj la bela "korea nacia spektaklo" eble aliaj kongresanoj skribos. Ĉiu ero meritas plenan paĝon.

Flugante el Seulo por reveni

ıejmen mi estis tre danka al la ·igla korea Esperanto-estraro kaj ıl la UK-anoj kaj aliaj sindonaj lediĉitaj esperantistoj. Baldaŭ en 1997 estos nia vico gastigi la Universalan Kongreson. Pretigu vin, Ozanoj! ❑





Atilio Orellana Rojas pruntas sian korpon por reklami Esperanto-aranĝojn aŭstraliajn
(Fotis Max Wearing)


RECRUITING 1995

At the moment Atilio Orellana Rojas has no fixed bookings immediately ıfter the January 1995 Summer School, which offers a perfect opportunity ·o increase the number of Australian Esperantists by engaging his ser·ices to teach beginners in other parts of Australia. Please contact Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069, soon with suggestions or pro·osals.

·A FONDUSO IDYSS EINIHOVICI POR LA ESPERANTO-EDUKADO KAJ VOJAĜADO DE INFANOJ ricevis ĝis nun $12000, sed multo plia estas bezonata Sendu vian ĉekon p/a Jana Bogoyev, 73 Newry St, Floreat WA 6014.

(PARTO DE) KOPENHAGO TRA LA OKULOJ DE NOKTOGARDISTO

DE BOB FELBY



Reveninte al Danlando post ses jaroj en Anglujo mi trovis laboron kiel noktogardisto. Nia oficejo situas en la mezo de Kopenhago, tuj apud la cirkokonstruaĵo. Estas ligna barilo inter la noktogardistejo kaj la cirko. Mi ankoraŭ memoras, ĉar estas tre malfacile forgesi, ke iun vesperon estis multe da bruo en la cirko. Simio tre timis sian posedanton, kiu estis klaŭno. Ĝi transaltis la lignan barilon kaj kuris al iu noktogardisto. Li ĉirkaŭbrakis ĝin kaj tre ĝojis. Tiam venis la klaŭno, kaj la simio denove timis kaj ekfekis sur la jakon de la noktogardisto. Tiam li do redonis la simion al la klaŭno. Li iris en la kelon por lavi sian jakon, sed ĝi tiom fetoris, ke necesis ke oni donu al li novan jakon.

Mi ekdeĵoris. Mi iris la longan vojon al la tombejo. Mi iris bicikle, atingis la malliberejon kaj daŭrigis laŭ la vojo al Valby, iama vilaĝo ekster Kopenhago, sed nun parto de la urbego. Sur la dekstra flanko iris la fervojo, pasaĝera kaj vara, la deklivoj de la fervojo estis tre verdaj kaj belaj. Kreskis eĉ arboj tie. Supre oni povis vidi la ĝardenojn de la honorloĝejo de Niels Bohr en la bierfarejo Carlsberg.

La Bierfarejo Carlsberg fondiĝis de J.C. Jacobsen. La fabriko estas nomita laŭ lia filo, Carl. Laŭ la deziro de Carl, la profito de la vendado de la biero devas esti distribuata inter arto, scienco kaj industrio. Oni povas do diri, ke ĉiu drinkemulo en Danlando subtenas la kulturon.

Do, mi daŭrigis mian bicikladon laŭ la menciita vojo, kaj atingis la judan parton de la tombejo. En ĝin mi ne rajtis eniri, do mi ne scias ion ajn pri ĝi. Tuj poste mi alvenis al la katolika tombejo. Ĝi estas iom pli nova ol la ĝenerala parto de la tombejo. Mi memoras, ke iu noktogardisto iris tien la 31-an de oktobro, la vesperon de ĉiuj sanktuloj. En oktobro estas tre mallume en la vesperoj, kaj ĉar li nenion scias pri katolikismo, timigis lin vidi ke en la tombejo sin movas centoj da monaĥinoj surmetante kandelojn sur la tombojn. Li forkuris al la ĝenerala tombejo, enlasis sin, eniris la oficejon kaj telefonis al sia oficejo: “Mi estas en la katolika tombejo, la mortintoj dancas, mi timas”. Oni devis trankviligi lin, kaj klarigi, ke estas la vespero de ĉiuj sanktuloj, tiam la monaĥinoj ĉiam faras tion, ili ne dancas. Li eniris! Ankaŭ mi eniris, kaj iris ĝis la katolika kapelo, la tiel nomita Orienta Kapelo. Estis tre mallume tie, sed mi vidis neniujn fantomojn, nur strigon, estis tiu sama strigo, kiun mi ĉiam vidis en la tombejo. Ĝi ĉiam rigardis min, kaj sekvis min ĉien en la tombejo, eĉ eksteren ĝis Carlsberg.

Do, nun estis mia vico iri al la ĝenerala tombejo. La ĉefa enirejo havas la plej grandegan pordegon,

kiun mi ĝis nun vidis. Ĝi estas farita parte el brikoj, parte el fero. La seruro estas ankoraŭ la originala, do la ŝlosilo estas preskaŭ same grandega kiel la kapo de ĝardena forko. Enirante mi iris iomete maldekstren kaj enlasis min en la oficejon. Tie, sur la muro pendis afiŝo de iu japana aktorino. Ŝia vizaĝo estis tute blanka. Ŝi estis multe pli timiga ol kiu ajn mortinto en la tuta tombejo.

Mi iris tiam dekstren por kontroli la pordegon ĉe la ĉefvojo. Poste suden al Norda Kapelo. Estis mallume, kaj mi tuj rimarkis, ke brilas lumo el la fenestroj. Ĉar estis tiom mallume, mi ne emis eniri por vidi, ĉu la mortintoj dancas. Mi decidis atendi ĝis la mateno.

Mi do biciklis suden ĝis alia, malpli granda pordo ĉe alia fervoja linio. Ĝi portis nur vartrajnojn, nenim pasaĝerojn. Kiel dirite, estis tre mallume, kaj ĉar bona biciklo estas tute senbrua, mi ne estis aŭdata. Kiam mi alvenis al la pordo, mi permane provis ĉu la pordo estas ŝlosita. Tuj ekster la pordo stariĝis homo, kaj kun la pantalono ĉirkaŭ siaj kalkanoj li forkuris kiel eble plej rapide laŭ la fervojo, postlasante fekaĵon ĉe la pordo. Tiaj momentoj ridigas noktogardistojn.

Tiam mankis al mi nur eliri el alia terure grandega pordo. Per tiu sama pordo eniras alia noktogardisto, kiu faras la duan kaj kvaran rondojn en la tombejo. Mi faris nur la unuan kaj trian. Ni do iris malsamajn vojojn en ĝi.

Tiam mi iris al Sudhaveno. Tio estas unu el la havenkvartaloj de Kopenhago. Estis bone deĵori tie, ĉar miaj gepatroj loĝis tie. Mi povis viziti ilin. En unu el la lokoj, kiujn mi devis gardi, iu granda firmao tenis sian stokon da elektraj aĵoj: gladiloj, bormaŝinoj, hejtiloj ktp. Kiam mi alvenis, mi vidis, ke parto de la muro mankas, kaj ke la fenestro en la pordo estis rompita, kaj ke ĉio estas kovrita de sango. Mi eniris kaj telefonis la policon. Kiam ili venis, ili decidis sekvi la sangospurojn, kaj tre malproksime, en herbejo ni trovis lin, la ŝteliston, tute senkonscia. Ambulanco forprenis lin. Tiam necesis, ke noktogardisto restu en la vartenejo la tutan nokton. Tio estis konsiderata bonega laboro. Oni nur sidas tie kaj aŭskultas radion la tutan nokton. Eble oni ankaŭ trinkas kafon. Sed ĉar tiom da radioaparatoj kaj hejtiloj malaperis, oni aranĝis ke la polico mem sidu tie la tutan nokton. Sed tio ne daŭris longe, ĉar nun malaperis eĉ pli da gladiloj, bormaŝinoj kaj hejtiloj. Sed iom post iom la asekura kompanio decidis financi la riparon, kaj ĉio normaliĝis.

Mi finis miajn rondojn en Sudhaveno, kaj reiris al la populara tombejo. Tie min salutis la strigo, kaj mi reciprokis. Kiam mi eliris el la oficejo, mi trovis ke staras aŭto apud ĝi. Estis tiu de la inspektoro, kiu loĝas en la tombejo. Li estis reveninta el la urbo kaj staris antaŭ la pordego ĝin ŝlosante. Lia dorso estis turnita al mi, li ne sciis, ke mi enestas en la tombejo. Mi alvokis al li: "Mi ne kontraŭas, ke vi eliras por streĉi la gambojn, sed vi ne rajtas forlasi la tombejon." Li preskaŭ ŝokiĝis pro timo, turnis sin, vidis ke estas nur mi, kaj elvomis kelkajn sakrojn al mi. Mi nur ridis.

Sekvate de la strigo mi tiam iris norden por kontroli la pordegon apud la ĉefvojo. Survoje tien mi

renkontis maljunulinon, kiu ploris apud tombo. Ŝi klarigis, ke estas la tombo de ŝia edzo, kaj ke ŝi ne povas dormi, ĉar ŝi ĉiam pensas pri li. Do ŝi prenis taksion, kaj iris al la tombejo por viziti lin. Mi demandis, "kiel vi eniris?" Ŝi klarigis, ke ŝi transsaltis la muregon. Mi akompanis ŝin al la pordego, ellasis ŝin, kaj vere, tie antaŭ la pordego atendis ŝin la taksio, kiun ŝi luis pli frue en la nokto. Malĝojo estas terura emocio!

Nun mi devis rapidi al Norda Kapelo por vidi kial la lumo brilas malantaŭ ĝiaj fenestroj. Alveninte tien mi malŝlosis la pordon kaj eniris. Multe trankviligis min vidi nur skafaldojn kaj farbopotojn. Estis nur mursmiristoj, kiuj forgesis malŝalti la lumon. Do mi faris tion, kaj ne verkis raporton pri la afero.

Inter Carlsberg kaj la tombejo estas mallarĝa ponto super la fervojo kaj la vojo. Ĉe unu fino de la ponto situas la domego de la nuna direktoro de Carlsberg. Ĝi estas unu el la plej luksaj domegoj en Kopenhago, ĝia tegmento estas farita el kupro.

Mi enlasis min en la ĝardenon de la direktoro de Carlsberg. Mi devis ĉirkaŭiri lian domegon kaj kontroli ĉiujn pordojn. Ĉe unu el la pordoj staris du bieroj por mi, aŭ pli bone, unu por mi kaj unu por mia amiko, la strigo. Ĉar la strigo restis alte en arbo, kaj ne volis malsuprenflugi, mi trinkis ambaŭ. Tiam mi trairis la grandan ĝardenon ĝis la vitraj domoj, kaj eliris la saman vojon laŭ kiu mi eniris. Tie mi adiaŭis la strigon. Li neniam sekvis min post la direktorloĝejo.

Nun ni eniris la bierfarejojn. En la ĉefa enirejo la pordisto regalis min per ankoraŭ du bieroj. Miaj klientoj estis ĉiam multe pli donacemaj ol mia propra direktoro. Mi komencis mian rondon en la bierfarejo. Ie en la korto mi surpriziĝis vidante strangan beston, kian mi neniam en mia vivo vidis. La bierfaristoj klarigis ke ĝi estas melo. Ĝi venas ĉiun nokton de la tombejo transirinte la ponteton por viziti la bierfarejon. Eble ankaŭ ĝi ŝatas bieron, mi ne scias, mi scias nur, ke la bierfarejo estas tre populara.

Malantaŭ Carlsberg, ĉe la piedo de la granda altaĵo "Valbybakke", situas "Bakkehuset", la altaĵa domo. Ĝi belege kontrastas kun la imponaj siloj kaj enboteligejoj de Carlsberg. Origine ĝi estis gastejo kvarala, nun restas nur du aloj. Malalta konstruaĵo ĝi datiĝas de 1763. Tie kolektiĝis la plej gravaj artistoj de la Ora Periodo. Famaj poetoj kaj sciencistoj renkontiĝis tie. Tie ili sidis interparolante, kelkfoje iu ludis la pianon kaj alia, ofte fraŭlino, kantadis. Belaj kaj ĉarmaj versperoj!

Hodiaŭ troviĝas en la domo honorloĝejo de iu dana poeto. Mi devis kelkajn fojojn ĉiunokte ĉirkaŭbicikli la konstruaĵon kaj certiĝi, ke ĉio estas en ordo. Ofte okazis tiam tre gravaj kunvenoj de artistoj kaj literaturistoj, tiuj kunvenoj okazis interne, mi devis resti ekstere en la malvarmo.

Preskaŭ tuj apud "Bakkehuset" situas frenezulejo. Tre malnova konstruaĵo, en kiu loĝas kaj infanoj kaj plenkreskuloj. Iun nokton mi renkontis virinon en la ĝardeno de unu el la multaj grandegaj vilaoj de Carlsberg. Kiam mi demandis ŝin, kion ŝi faras, ŝi montris al mi grandegan trancilon. Mi kaptis ŝin je la

CORRECTION

In the English Supplement to our July-August issue (1994/4) it was incorrectly stated that the Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel is a private Foundation, independent of the Australian Esperanto Association. It is in fact an official Fund of the Australian Esperanto Association, as is stated correctly on page 27 of the *Adresaro* which accompanied that issue.

LEARNING ESPERANTO ON THE NETWORK

by David Poulson

1.0 *What is the Network ?*

For a detailed answer to this question I refer you to a very good essay by Don Rogers which appeared in *Esperanto sub la Suda Kruco* earlier this year ("Esperanto Jam Sukcesas" Majo-Junio 1994) For the purposes of this article, I will provide three short definitions:

1.1 Technical

The Network is the aggregate of information services and resources available on a global system of inter-connected computers.

1.2 Non-Technical

The Network is the largest gathering of human beings ever assembled, and there is no one individual, group or institution in charge.

1.3 Personal

The Network is like a multi-storey building, on one floor of which are 2,701 so-called newsgroups. One of these groups is called "soc.culture.esperanto" (see Don's article for further explanation) and within that tiny nodule of the whole network one of the most successful personal initiatives in the history of Esperanto has just taken place.

2.0 *Background*

The campaign to produce and promote an Esperanto course on the network, using only electronic mail, was launched in March 1991. Derk Ederveen—a name I hope you will remember—has described the background to this campaign and its first months of activity in an article entitled: "Lerni elektronike kaj tutmonde." It appeared on pp 204-205 of the November 1991 issue of *Esperanto* (no. 1031) and I strongly recommend you to re-read it. Dig out your old issue if you are a subscriber, otherwise borrow a copy. Considered in the light of the facts presented below, it has become a seminal text.

3.0 *The Course*

The Esperanto course used on the network was *not* the result of a major new creative effort. In fact, the origin of the course was the Free 12-lesson Introductory Course which was produced in England at least 15 years ago and which has also been extensively used in Australia for about the same length of time. An altered version of that course, re-written to suit American users, was provided to Derk by Mike Urban, and Derk fixed up this version to suit an electronic mail environment, making only minor changes of a technical nature. I think that it is important to keep in mind that in this article I am discussing a revised version of the course which is readily accessible, for less than a dollar, to any Australian or New Zealand Esperantist or Esperanto Group that wishes to actively promote it.

4.0 *The Advertisement*

It was originally intended that the course would be advertised in the following way. A

very short and simple notice, in both Esperanto and English, would be posted each month to the network usegroup "soc.culture.esperanto." Now that's the first surprise isn't it? At first glance to select that way of advertising seems about as pointless as advertising our free 12-lesson course in *this* journal, or in *Monato* or *Heroldo de Esperanto*. Why bother? Wouldn't everybody reading the ad already know Esperanto? Well, for the reasoning behind his decision you are going to have to read Derk's previously mentioned article in *Esperanto*. My concern is to tell you what level of response was received.

5.0 *The Result*

In April this year, just 3 years after the first advertisement was placed, Derk was obliged (for technological reasons related to a change of employment) to relinquish his role as co-ordinator. In his last message to the network he provided a statistical summary of the activity which took place during that 3-year period. Computers, of course, are very good at keeping statistics and producing analytical reports from them —at least they are provided a clever chap like Derk inputs the data and knows how to operate the program.

The table below was compiled from statistics provided by Derk and by his two assistant co-ordinators, one of whom ran the course on Bitnet and the other on Fidonet. (The network is, in fact, a network of network of networks of ...)

5.1	Total no. of student enrolments: 1,269
5.2	Total no. of students who finished the course: 205
5.3	No. of students still actively studying: 154
5.4	No. of students who dropped out: 910

And, since we are operating in cyberspace and realtime (!) and the picture is constantly changing, here is the latest update to those figures which is available (i.e. as of 20/8/1994).

5.5	Current number of active students: 175

5.6 Additional numbers of students who have finished: 13. (Many of the students who "graduated" from the beginners' course went on to enrol in an intermediate course. I am tutoring two from the USA myself. But that's another story for another day).

6.0 *Implications*

Well, that's the second surprise! A grand total of 1,269 enrolments. Amazing isn't it? But wait a minute! Let's think about this more carefully. Ask yourself what would happen if the Correspondence course services of the Australian and New Zealand Esperanto associations had received *between them* 1,269 requests for places in a beginners' course during that same 3-year period. Do you realize that that works out at 8 requests per week, *every week for three years*! It should be very obvious to you that all of the combined resources of both national associations would find it very, very difficult to cope with that number of requests. You should also by now be coming to the realization that Derk pulled off a minor miracle in rounding up sufficient tutors to deal with more than 1,200 new students. And the inescapable conclusion—which I think is the biggest surprise of all—is that 1,269, large though that number is, only represents the number of students who were *admitted* to the course. It's not the total number who applied—*it's all there was room for*. And because of this totally unexpected response, instead of advertising in "soc.culture.esperanto" every month for three years, as was originally intended, only 14 notices were posted during the whole 36 month period. There is a constant waiting list of students waiting for tutors to accept them.

7.0 *Conclusion*

What a sensational result! Where did all of these students come from? Well, I don't know about the ones who dropped out but I do have a list of the names and e-mail addresses of all of the graduating students. I'm not looking at it too closely at the moment though, because I noticed that one of them is at Curtin University—right in my own

backyard. How embarrassing! And there are other Aussies represented too. Really, there can be no serious arguments about what these these results imply. They show that a lot of people *will* show interest in learning Esperanto, *will* make the commitment to enrol in a course, and *will* put in the effort to finish it, provided that some essential pre-conditions are met. I think that the main ones are:

- They must be told *where to get* information.
- They must be given *the right* information (i.e the right course).
- It must be "*free of charge*".

The last point is important. Although our Correspondence courses are tremendous value for money, only *we* know that. You really need to have done the course, or to have tutored it, before you can arrive at any possible evaluation of its worth. To a casual enquirer, we are not talking about a budget-priced course of high quality with freely given tuition, we are talking about an initial investment of $30.00 or so, plus postage costs of several dollars more, plus time. And for many people, that represents too much money to risk for something which they have not even seen, let alone tried.

I believe that we must really push the free 12-lesson course,—but not in its present form. It needs some serious revision (I have just had a PhD student make a terrible mess of it) and I have, in fact, begun this task and re-written the first 5 lessons myself. By the end of the year, I will have re-written a few more, and even if I don't get to Lesson 12 , my experience is that provided a student sails through to about Lesson 9 without encountering any serious problems, they will probably go on to finish the course even with the present Lessons 10—12 . They are, after all, not that bad! (We have been using them for nearly 2 decades). They are just "too hard"—without going into details.

So, to conclude, I want to encourage all local groups to set a definite goal to really push a revised version of the 12-Lesson course very hard in 1995. Either copies of Lesson One or, alternatively, smaller, cheaper fliers advertising the course need to be placed around Colleges, Universities, Community, Health and Recreation Centres, Churches, in the waiting rooms of health practitioners, hairdressing salons, in chip shops, Chinese take-aways, (there's always some grotty reading material lying about there) and, in fact, anywhere that people are regularly kept waiting around looking for something to read or distract their attention.

It may be that the "curiosity approach", i.e. a very simple and relatively uninformative message, like the one which was used with such astounding success on the network, will be as effective, if not more so, than actually leaving sample copies of Lesson One. Why don't we try both and then compare the relative success of each method.

Will Club Presidents, please, consider making this an agenda item for their next meeting? For the cost of a few reams of photocopying paper (which can now be purchased very cheaply through major discount stationery suppliers, such as Viking), literally thousands of attractive notices can be produced from a laser-printed, computer-formatted master. It's just so easy!

We can all take heart from what Derk Ederveen achieved through his own personal initiative, belief, and hard work with due acknowledgments to the gallant band of helpers.(..well done Nick Nicholas! ...) who joined him. Most of them, afterwards! Let us now see what a combined effort from two national associations can achieve. Who is prepared to support a goal of enrolling 300 new students in the revised Free12-Lesson Course next year?

Note

Copies of the following documents can be had from the writer in exchange for suitable quantities of postage stamps to cover photocopying, postal and packing costs.

"Lerni elektronike kaj tutmonde"

Statistical summaries of student enrolments etc.

Free Introductory Course—rewritten lessons. (So far, only 1-5).

Address: David Poulson, 6 Barlee Place, Edgewater WA 6027, Australia.

SENATOR GARETH EVANS REPLIES TO JUSTICE KEP ENDERBY

[In our May issue at Justice Kep Enderby's request we published a letter he had sent to the Minister for Foreign Affairs, Senator Gareth Evans. Justice Enderby asked what action the Australian Government had taken towards implementing the UNESCO resolution of November 15, 1993 concerning the introduction of Esperanto into member countries' school systems. Senator Evans has sent us his reply as follows:]

19 July 1994

Dear Kep,

Thank you for your letter dated 22 March 1994 regarding the international language Esperanto. I apologise for the delay in replying.

I understand that UNESCO was most active on Esperanto issues between 1950 and the mid 1980's. Since then, there has been little work done on the subject and in fact no-one is currently working on Esperanto at the UNESCO Secretariat in Paris.

The Australian Permanent Delegation to UNESCO in Paris has followed up your questions directly with the UNESCO Secretariat and have reported that little, if anything, has been done on the subject of Esperanto by way of reports or responses to the various resolutions to which you referred. While several European members have occasionally raised the issue, there is no strong or broad interest within UNESCO. The Australian Government has not made any statement about Esperanto at recent UNESCO meetings or General Conferences.

I am able to report however that the Italian non-government organisation Esperanto Radikala Asocio have developed a project called "Fundapax", which has been funded by the Italian National Commission for UNESCO. The Fundapax Project aims to promote communication and international understanding, democracy and peace among children by means of Esperanto. During 1994/95 the Fundapax Project plan to have groups from 10 different countries communicating with each other, through the recruitment of a network of "Fundapax teachers" from among UNESCO Associated Schools. (A copy of the project is attached for your information.)

Thank you also for your kind remarks. I hope that you are continuing to enjoy your retirement from politics...

Yours sincerely,

Gareth

[Senator Evans enclosed a 15 page heavily documented report titled "International Languages", prepared by the Italian Ministero della Pubblica Istruzione, Commissione sulla lingua *internationale* (detta esperanto), Decreto Interministeriale 29 aprile/5 ottobre 1993", submitted by the Esperanto Radikala Asocio, and details of the Fundapax Project concerned with preparation of teaching aids for Esperanto in primary schools.]

Correction: a line dropped out between the bottom line of p.1 and the top line of p.2 of our English supplement in the last issue. The missing line should read "does not distinguish between the male and female organs, using the same word *kaká* for both".

mano kaj tiris ŝin al la frenezulejo. Vekinte la estron de la frenezulejo mi sciiĝis ke ŝi loĝas tie, kaj oni enlitigis ŝin.

Tiam mi faris mian rondon en la frenezulejo. En la kelo mi trovis dormantan junulon. Mi vekis lin kaj demandis, kion vi faras ĉi tie? Mi kiel infano loĝis ĉi tie, li respondis. Nun li loĝas en alia frenezulejo. Sed bedaŭrinde li sopiris al la feliĉa hejmo de sia infana tempo, kaj en la nokto ŝteliris tien. Do mi devis denove veki la frenezulejestron kaj demandi, ĉu li konas la junulon. Feliĉe jes, do oni trovis ankaŭ por li liton por la nokto.

Do tio estas nur iomete el tio, kio povas okazi dum ĉiuj aliaj dormas! Mateniĝis, kaj mi iris hejmen dum ĉiuj aliaj iris laborejen. ❑

RADIO 3.ZZZ

RAPORTAS SVETISLAV KANAĈKI

La 26 junio estis la kvina datreveno de la komenco de la Esperanto-programo en Radio 3.ZZZ. Nia granda entuziasmo havi Esperanton en radio ne iris tute glate, estis plurflanke grandaj malfacilaĵoj. Kiel kutime Esperanto havas malamikojn ĉie kaj ĉiam. Tiel, ankaŭ en ĉi tiu radiostacio inter naciaj disaŭdigantoj, kaj speciale inter la estraranoj mem kiuj estas elektataj de la komitato. Ni travivis tiujn problemojn kaj nun ni estas regulaj membroj kaj ni sentas nin hejme.


Jenni kaj mi estas tre dankemaj al la membroj de Amikoj de Esperanto en Radio 3.ZZZ. Ĉar sen la membreco ni ne havos programon. La financa subteno en nia *Radiothon* estas granda helpo. Aparte ni dankas al la brisbana federacio kiu donacis $50, kaj al la adelajda societo kiu donacis $100 por la *Radiothon.* Ni dankas al AEA kiu donacis $200 kaj al Ge-sroj Aulsebrook ($50), Sandra Connors ($20), Terence Manly ($5), Phillip Thompson ($5) por nia propra elspezo.

3.ZZZ ĉiam pliboniĝadas. Nun nia radiostacio planas instali satelitantenon kiu ebligos al ni disaŭdigi tutlande.


Sonbiblioteko

Dum la Somera Lernejo kaj Kongreso de AEA en Adelajdo, Max Wearing proponis fondi sonbibliotekon, el kiu ĉiu povus pruntepreni laŭnecese kasedojn parolatajn, muzikajn, aŭ vidbendajn.

La Esperanto - Radio - programo havas eblon disponigi iom da materialo. S-ino Joyce Turner donacis sian stokon (21 diskoj kaj 35 kasedoj) por tiu celo. Nuntempe ni disponas pri 55 diskoj kaj 68 kasedoj. Kiu deziras pruntepreni povas peti provizoran katalogon. ✉ Svetislav Kanaĉki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149 (☎ 03 807 9573). ❑



SAMARKAND



Saluton! Se vi ankoraŭ ne forgesis kiel rideti, ridetu do (kial ne?) kaj sendu tiun ĉi rideton (aŭ eĉ ridetojn) al nia internacia ekspozicio subtitole *La Mondo Ridetas*. Vi ankaŭ povas inviti rideti kun ni viajn parencojn, amikojn, kolegojn, najbarojn, hejmbestojn... Partoprenante en nia plej serioza transnacia kaj translingva ridet-projekto, vi havos oportunon trovi novajn amikojn, rakonti pri vi mem kaj diri/deziri kion ajn vi volas al la homoj vizitontaj la ekspozicion.

Do, prenu kaj ekspedu viajn ridetojn al ni en *ajna* ebla formo (foto, desegnaĵo, printaĵo ktp.). La aĝo de ridetontoj kaj la kvanto/dimensio de viaj kontribuoj estas *nelimigitaj*. Dankon!

Eku do kaj komencu rideti...plejeble baldaŭ, hodiaŭ, tuj, ĝuste nun. Atendante viajn ridetojn ĝis la fino de 1994, samideane restas kun amikaj ridetoj, ridet-aktivuloj de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, pk 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano.

[Postnoto de la redaktoro de *ESK*: sendu kopion de via(j) kontribuaĵo(j) ankaŭ al ni, kaj la plej ĉarma rideto elektita de Odlo Bokserp ricevos specialan premion: ekzemplerojn de la unuaj poŝtmarkoj eldonitaj en Uzbekistano, unu el la unuaj monbiletoj eldonitaj en Uzbekistano, kaj la originalon de la bildo ĉisupre represita, ĉiuj provizitaj de la Internacia Muzeo. Sendu al Donald Broadribb, redaktoro de *Esperanto sub la Suda Kruco*, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio, antaŭ la 16a de oktobro.] ❑

LINGVA ANGULO
de ALAN TOWSEY

First of all, no one has yet submitted suggestions for "working bee" and "ringabout". Could it be that no one was game to challenge our learned editor?! But I'm sure that he, like myself, would never take umbrage at disagreement or correction—indeed, in our search for perfection in the use of Esperanto, we would welcome it (neither of us claims to be infallible!).

So I will suggest that, analogously with Peter Benson's suggestion for "sewing bee", ***labora kunveno*** may be just right. Re "ringabout", our editor's suggestion ***distelefonado*** does not contain the idea of fund-raising. But there is a word in *PIV:* ***kvesti***, defined as "Peti kaj kolekti monon, por religiaj aŭ bonfaraj celoj". So I suggest ***telefonkvestado***. Any further suggestions?

ALIO ktp.

From Pat Harkins comes the question: "Mi scivolas pri la uzado de la vorto ***alia***. Ĉu oni povas uzi ĝin kiel korelativon, same kiel la aliajn korelativojn, ekzemple:

aliu	— another person	aliel	— in another way
alio	— another thing	alial	— for another reason
alia	— another kind	aliom	— another quantity
alie	— another place	alies	— another's

Mi kredas, ke mi legis kelkajn, sed ne la tuton de la ĉi-supraj vortoj."

I have already replied to Ms Harkin, but others may also be interested in the question.

Plena Analiza Gramatiko de Esperanto says (p.86):

"Oni provis kaj nun, pli-malpli ofte, uzadas la (nefundamentan) deklinacion (genitivo nur pri personoj):

Nominativo	aliu	alio	aliuj
Akuzativo	aliun	alion	aliujn
Genitivo	alies	—	alies
Prepozitivo[1]	je aliu	je alio	je aliuj

Ekzemploj: *iuj alvenis, aliuj foriris*; *ies gajno, alies perdo* (B. Mudie, 1906), ktp.; *tio kaj alio*[z]."

Plena Ilustrita Vortaro says, under ***alia***, Rimarko 3:

"La vorto **alia** kaj ĝiaj derivaĵoj estis iafoje asimilitaj al la tabelvortoj, kaj oni renkontas la formojn *'aliu', 'alies'* ks; Z. avertis, ke ili estas 'kontraŭ-

[1]"Prepozitivo" = formo antaŭata de prepozicio.—Ed.

regulaj'; krome la formo *'alie'* en tiu nova sistemo devus signifi 'aliloke', kio kreus konfuzon pri la nuna konstanta uzado en la senco 'alimaniere'; maksimume allasebla estus la formo poseda: *ies gajno, alies perdo*."

Butler's *Esperanto-English Dictionary* says:

"A proposed correlative series *alial*...is inadmissible (*alia*, *alie* having other meanings). Nevertheless, *alies* (col.) = someone else's, though unorthodox, is useful."

To sum up, then, they should be avoided, using *io alia*, *iu alia* etc., with the possible exception of *alies* (see further below). *Alie* cannot mean "elsewhere" (aliloke); it already means "otherwise" (alimaniere; se ne). *Alia* just means "other", not "of another kind" (alispeca). On the other hand, *alies* is unambiguous: *ies alia libro* for example, means "someone's other book"; "someone else's book" is *la libro de iu alia*—here *alies libro* seems neater.

It is interesting that, although Zamenhof, according to *PIV*, warned that these forms were "kontraŭregulaj", he himself used *alio* in the expression "Tio kaj alio" in his translation of the Old Testament, in Ecclesiastes (La Predikanto) 11:6!

It seems to me that more logical forms would be *aliio* (ali+io). *aliiu* (ali + iu), etc., but these seem never to have caught on.

APPOSITION

The Oxford Companion to the English Language says: "Two consecutive, juxtaposed nouns or noun phrases are in apposition when they refer to the same person or thing, and when either can be omitted without seriously changing the meaning or the grammar of a sentence."

An example would be "Charles, the Prince of Wales", where "Charles" and "the Prince of Wales" are in apposition to each other.

In Esperanto a difficulty often arises when the two expressions in apposition are the *object* of a verb or preposition: does one use the accusative ending -n on both, or only on the first?

This can be a very complex problem, and I do not propose to go into it in great detail as most beginners (and probably many reasonably advanced students also!) would end up utterly confused. More advanced students are advised to read it up in *Plena Analiza Gramatiko*, §132, from which most of the following examples are taken.

The general rule of thumb is this: if in speech there is a pause between the two with equal emphasis on both, or in writing a comma is inserted between the two (corresponding to the spoken-language pause and equal emphasis), add -n to both. If there is no pause (or comma), add -n only to the first. So:

Li venenis eĉ kardinalo**n**, Johano-Baptisto**n** Orsini. (*PAG*).
(The remarkable fact here is that he even poisoned a cardinal, by name J.-B., the name here being of secondary importance.)

Li venenis eĉ (la) kardinalo**n** Johano-Baptisto Orsini. (*PAG*)
(The remarkable fact here is that he poisoned Orsini.)

(Li punis) la filo**n** de mia amiko, Karlo**n**. (*PAG*)
(*filon de mia amiko Karlo* would mean that the friend's name was Karlo.)

(Mi lernas) la lingvo**n** Esperanto de Zamenhof. (*PAG*)

(Ĉu vi konas) la lingvon de Zamenhof, Esperanto**n**? (*PAG*).

Li prenis sian edzino**n** Oholibam**a**, filino**n** de Ana, fratin**o** de Basmat (the sister is Ana) (*PAG*)

Li prenis sian edzino**n** Oholibam**a**, filino**n** de Ana, fratino**n** de Basmat (the sister is Oholibama.) (*PAG*)

(Mi prezentu) mian amiko**n** Petr**o** Frank. (*PAG*)

Mi renkontis tie certan amiko**n**, Petro**n** Frank.

Ĉu vi konas doktoro**n** Ludoviko Zamenhof?

Oni trovis inter la kondamnitoj eĉ doktoro**n**, Bruno**n** Karg. (*PAG*)
(the surprise is that there was even a doctor among them.)

Oni trovis inter ili eĉ doktoro**n** Bruno Karg. (*PAG*)
(the surprise is that Bruno Karg himself was among them.)

Li transloĝiĝis en la hotelo**n** Lusitani**a**. (*PAG*)

After quotations:

Zamenhof mem uzis la vorton "alio".

Mi sendos al vi ambaŭ librojn (*Aŭstralia Antologio* kaj *Plena Ilustrita Vortaro*).

La germana *Haus* signifas Esperante 'domo' (= signifas ĉi tion: domo) (*PAG*)

(Mia) lingvo...havas la nomo**n** Esperan**o**.[z]

Vocative[1]/Interjections: Use the nominative[2]—in writing, often with *ho* preceding, and/or followed by a comma:

(Ho) miaj amikoj, helpu min! (Miaj amikoj helpu min = Let my friends help me).

Ni atendas vi**n**, Savonto de la mondo.[z]

Ĝi vi**n** interesas, Evelino?[z]

---

[1]Vocative = using someone's name in order to draw their attention or to emphasize that you are speaking to them.—Ed.

[2]Nominative = the ordinary form ending in -o or -a.—Ed.

I include here also:

Mi sentis mi**n** feliĉ**a**. (= esti feliĉa; sentis, ke mi estas feliĉa)
senti sin (kiel) hejme. (= kiel oni sentus sin, se oni estus hejme)
Mi min sentas nun ne tute bone.[z]
senti sin komfort**e**. (*komfort**a*** usually refers to *things*—chairs, etc.)
teni la okuloj**n** fermitaj. teni al si la stomako**n** varm**a**.

konsideri ion (esti) bona.

Oni elektis li**n** kiel prezidanto**n**. Oni elektis lin (esti) prezidant**o**.

Mi elektis lin kiel prezidant**o**. (In my capacity as president, I chose him)

Mi ĉiam traktas li**n** kiel frato**n** (as one would treat a brother)

Mi ĉiam traktas lin kiel frat**o**. (as a brother should [treat a brother]—I am his brother.)

Li uzis sian bastono**n** kiel armilo**n**. (used his stick as a weapon)

*See also my discussion of the agreement of the participle in *ESK* Nov.-Dec. 1993. ❑

---

[1]Many speakers/writers find this hard. An easy rule of thumb for whether to use -n on the adjectives in such sentences is to see whether it would make sense to put the adjective before the noun. If you try this, you will find that "teni la fermitaj**n** okuloj**n**" is not at all what you want to say. (Compare: keep your closed eyes/keep your eyes closed). If it does not make sense to put the adjective before the noun, then you know that the adjective does not take a final -n in the phrase you are composing.—Ed.

LA PLEJ GRANDA FENESTRO
RECENZAS DONALD BROADRIBB

*Recenzo samtempe aperanta en **Bulgara Esperantisto***

La Plej Granda Fenestro, de Prof. D-ro Kiril P. Popov. Sofio: Bulgara Esperanto-Asocio, 1992. 78p.

Esperanto aĝas jam 107 jarojn kaj ne plu estas novaĵo sed havas veran historion. Historion oni povas legi, kaj skribi, dumaniere: per seka kvazaŭobjektiva listo de eventoj, kun iom da literatura vestaĵo por ke ĝi estu iomete interesa. Aŭ per subjektiva sed ĝuste pro tio fidebla rakonto pri onia propra rolo. Kiom volonte ni legus la historion de Esperanto laŭ la rememoroj de Zamenhof en, ni diru, 1914! Kiom instrue estus al ni legi detale la spertojn kaj pensojn de Kabe laŭ lia vidpunkto, en tiu momento kiam li decidis "kabeiĝi"! Kaj aliaj pioniroj—ĉar pioniro povas vivi dum iu ajn epoko, ne nur en la komenco—ni neglektas ilin, kiam

ili estas kun ni; nur post ilia morto ni konsciiĝas ke ni neniam aŭskultis de iliaj buŝoj la plej gravajn partojn de ilia kaj de nia propra historio.

Kiril Popov estas pioniro. En sia libro li parolas pri si kaj pri Esperanto, honeste, malkaŝe: "Ĉu la okupo pri Esperanto estis utila, aŭ tio estis vane pasigita, perdita tempo? Fin-fine kio estis Esperanto por mi? Kio estis Esperanto por mia vivo, ĉar mi pli ol 55 jarojn ne forlasis ĝin!"

Kiril Popov ne estas modela Esperantisto, kian kreus legendoj aŭ la fantazioj de gloranta aŭ malgloranta verkisto pri Esperanto. Estas vere ke la socio, prave, dirus ke la aŭtoro estas grava persono, kaj tia estas ankaŭ senrilate al Esperanto. La Bulgara parto de Esperantio scias ke sen li ĝi havus alian karakteron. Bulgaroj, do, povas legi kaj ĝui ĉi tiun libron por recertigi al si mem ke ankaŭ inter ili ne mankas elstaraj personoj kiuj kontribuas al sia parto de la monda socio.

Sed kial mi, nebulgaro loĝanta multmil kilometrojn for de Bulgario, trovas la verkon de Profesoro Popov leginda? Ĝuste ĉar li ne estas mita "modela" Esperantisto sed vivanta homo. Kial li gravas al mi? Aŭ inverse, kial mi gravas al li? La respondon donas la titolo de la libro. Tiu titolo originis en dirajo de iama instruisto kies lernanto estis tre juna Kiril Popov, "Ĉiu lingvo estas fenestro al la mondo."

Ĉu mi rajtas diri al vi ion malagrablan? Post tuta semajno da senpaŭza rigardado al la televido aŭ de legado de la tagĵurnalo, ĉe ni oni eĉ ne scius ke Bulgario ekzistas? Nia televidekrano estas fenestro, sed ne fenestro al la mondo, nur al partoj de la mondo. Mi verŝajne ne multe eraras, kiam mi konjektas ke tute same estas en Bulgario.

Kiel, kaj kial, do, tre talenta literaturisto—la [bulgara] redaktoro mem—kies nomon tamen rekonus neniu aŭstralia neesperantisto—petis min recenzi libron por vi? Kaj kiel okazis ke legante tiun libron mia vivo pliriĉiĝis? Ĝi riĉiĝis, cetere, ne per ekscio de "faktoj" kaj nomoj, sed per ekkono de persono(j) pri kiu(j) mi alimaniere neniam konscius. Ĝuste ĉar Esperanto estas fenestro al la mondo en mia vivo kiel ankaŭ en tiu de Profesoro Popov. Kaj tra tiu fenestro la bulgara redaktoro kaj mi vidis unu la alian. Nun mi vidis ankaŭ profesoron Popov. Tiu fenestro apartenas ankaŭ al vi. Legu la libron, kaj pli larĝe malfermu la fenestron en via vivo.

PRI TIPA ESPERANTISTO, ESPERAN-TO-LINGVANO KAJ...HANDIKAPOJ

DE ALEKSANDRO S. MELNIKOV

Pri Tipa Esperantisto, Esperanto-Lingvano kaj...Handikapoj de Aleksandro S. Melnikov. Rostov-Na-

Donu 1992. 14p.*

La libreto kostis al mi $20 dum la Somerlernejo en Januaro ĉi-jare ĉe Adelajdo, ĉar tordis delonge al mi la brakon la aliegoo de nia amiko Odlo Bo. (Kaj senpage surskribis aldone la aŭtoro: "Kun kompato pro la perdota pro-lege tempo".) Sed pli malmalavaremuloj povis ĝin aĉeti kontraŭ nur 3,600 rusaj rubloj, aŭ du aŭstraliaj dolaroj.

La presaspekto de ĉi tiu legaĵeto estas tiom aĉa, ke Odlo en siaj plej fantaziaj revoj ne povus trovi tian allogan hejmon. Makuloplenaj paĝoj, mikroskopaj literoj, nekredeblaj vortdispecigoj. Kredu ne kredu, preskaŭ ĉiu linio finiĝas per streketo, kaj eĉ la vorto *kaj* vidiĝas tiel:

k-
aj. Imagu ankaŭ: i-
usenca, d-
aŭrige, e-
ksplikote, m-
ovado (jes ja!). Supersignoj nek tute mankas, nek tute troviĝas. Iuloke ekzistas ĵ kaj ĉ, sed sampaĝe ankaŭ j' kaj c'! Verŝajne oni uzis du tajpilojn por pretigi—sed por la sama paĝo...! La duoncirklo ˘ tute malestas. Terura komposto. (Ĉu bona kompoŝto?)

Sed la enhavo! Melnikova mielo. Pura "I'm too sexy for this tee-shirt"-eco. Averto: ĝi ne taŭgas por komencantoj, nek por malliteraturemuloj (aŭ, se vi preferas, literaturmalemuloj). Almenaŭ familiariĝu kun Beaucaire, Schwartz, Baghy, *PIV* kaj *PAG*. Se ne, vi ne komprenos, ekz., la aludon al R. Ŝerc, nek al "kiso julie varma".

Vortvariadoj pluregas. Malneologismemuloj paliĝos je "ŝipe, ĝipe (el la lolita lando), ĉipe" (provu etkoste!!), kaj Odlo sentis sin hejme en ĉi tiu kompostpoŝto/por-postaĵo. Nur unu ekzemplo el pluraj trovendaj: "C'kio" devus esti "Ĉi tio".

La aŭtoro opinias, ke "Ĉiu lernejano scias, ke la tero sin apogas sur la tri akvaj bestoj." Kaj demandas, "Kio estas la nomo de la tria? Kio estas la nomo de la unua? Kaj la dua?"

Tamen, la teksto vere plaĉas. "'Vi solidaras kun mi?' 'Certe'. 'Ĉu vi iam nomis viajn krurojn "deligitoj"? Ĉar ili estas la ĉefaj faktoroj de l'movado...'" Adstringaĵoj trafetas, ekz. "Brave. Kaj malprave." Jes, sed ĉu la Ĉinoj komprenus la ludojn? Jes, se ili estas vere Tipaj Esperantistoj. Kiel kompreni "krokodili", "Kabei", "kongresi" alie? Ĉar "Tiu(j) subtilaĵo(j) ne povas nesti en la kapo de nemovadano."

Apenaŭas diri, ke ĉi tiuj perletoj plaĉos tiom al la "konjoŝenti" (nu, do, sciemuloj, progresintoj, v.T.E.-oj), ke, miaopinie, la juveletoj kiuj sin kaŝas en krude kompostita kaĉo devus esti poluritaj por malkaŝe brili. Indus, kun la permeso de la aŭtoro, reeldoni la libreton en la formato de nia nepre bela *ESK*. Mi pretas provlegi por frustri la frivolemojn de Odlobo. Dume, gratulojn A-
leksandro. ❑

Verkis Ve ra Payne

* [Ĉi tiun tekston afable kompostis Odlo Bokserp.]

LA FREMDULO
RECENZAS DONALD BROADRIBB

La Fremdulo, de Albert Camus. Tr. Michel Duc Goninaz. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1993. 142p., broŝ. Akirebla ĉe la AEA Libroservo.

Kiel recenzi klasikan verkon? Ĉar ĉi tiu libro unue aperis, franclingve, en 1942, kaj estas unu el la plej konataj verkoj de la franca ekzistencialista filozofo-romanisto Albert Camus. Rilate al la Esperanta vesto: la traduko legiĝas facile, klare, tiel ke plejparte oni forgesas ke oni legas tradukon kaj ne originalan verkon. La spirito de Camus traradias senĝene.

Ĉu mi rajtas diri ke ankaŭ la spirito de Francio en 1942? Ĉar retrorigardante, estas malfacile distingi inter la menso de la verkinto kaj la stato de la socio en kiu li vivis. La preskaŭ kompleta subpremo de emocio (ĝi ekaperas vere nur en la lasta ĉapitro, kaj tie nur milde), la sin-turno for de la socio, kiu estas nekomprenebla, tial "normala", la deprima sento kiu estas multe pli forta ol nura pesimismo, pri la senceleco de la vivo, eĉ ĝia malsignifo. (Ne de la vivado, tio estas alia afero. Mem vivi, ne morti, montriĝas esti tre grava afero, en la lasta ĉapitro; ĉu alia persono vivas, nu, tio tute ne gravas...) Se vi neniam antaŭe legis verkon de Camus, estu avertita! Jen "ne ĉies taso da teo" laŭ la angla esprimo [= ne plaĉa al la gusto de la plej multaj personoj].

Estas iom stranga spirita parenceco inter *La Fremdulo* kaj la ĉina majstroverko *Frosta Nokto* de Bakin (verkita en 1944-5), kvankam la stilo kaj enhavo estas, komprenеble, tute aliaj.

En *La Fremdulo* malmulto okazas. Ŝajne. Efektive, jes, sed la ĉefrolanto preskaŭ nek sentas nek valorigas agojn, la proprajn aŭ alies. La romano dividiĝas en kvar partojn: la morto de kaj funebraĵo pri la patrino de la ĉefrolanto; la eventoj kulminantaj en la murdo de arabo fare de la ĉefrolanto; la juĝproceso; pensoj inter la mortverdikto kaj la plenumiĝo de la ekzekuto. La unua kaj la kvara partoj estas nelongaj, kvankam tre gravaj.

Sed ne supozu ke vi legos libron de filozofio. Moraleco, unu el la ĉeftemoj de Camus en postaj verkoj, vere ne pritemiĝas en ĉi tiu romano. Religio (pli precize, ateismo) trovas mencieton nur en la lasta ĉapitro. Trafas la leganton ne konceptoj sed sento: la malatentindeco de ĉio.

Mi jam diris: "ne ĉies taso da teo". Sed klasika verko, havenda en la Esperanta literaturo. (Kial ĝi ne aperis jam antaŭ jardekoj?) ❑



Albert Camus

TEORIO KAJ PRAKTIKO DE LINGVO-INSTRUADO

RECENZAS DONALD BROADRIBB

Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado, de Mag. Irena Szanser. Budapeŝto: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1992. 170p., bind. 24gld. ≈ $20. Speciale mendebla per la Libroservo de AEA.

Ĉi tiu libro estas unika en la nuntempa esperanta verkaro, do speciale atentinda. Ĝi ĉefe valoras por trejnantoj de Esperanto-instruistoj. Krome, profesiaj instruistoj en ŝtatlernejoj trovos la kernon de la libro utila, rilate al la preparado de Esperanto-lecionoj. Amatoraj Esperanto-instruistoj riskas konfuziĝi anstataŭ helpiĝi per la libro.

La libro dividiĝas en tri ĉefpartojn: (1) "Ĝenerala lingvistika kaj metodologia enkonduko", kiu estas koncizega prezento de lingvistikaj teorioj kaj instrukonceptoj; (2) "Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado", kiu estas detala klarigado de la principoj kaj enhavo de instruhoroj, kun abunda materialo por helpi konstrui tiujn horojn; (3) "Elektitaj problemoj de psikologio" kiu estas iom vagema kaj tre neklarcela prezento de diversaj neŭrologiaj informoj, plus iom detala prezento de la enhavo kaj aplikado de "kondut-psikologio" (la aŭtoro preferas nomi ĝin "behaviorisma psikologio") en la lingvo-lernado kaj -instruado.

Specife, la libro utilas por la lingvoinstruado en la lastaj tri jaroj de la elementaj lernejoj kaj eble la unuaj unu aŭ du jaroj de gimnazio, en la aŭstralia lernej-sistemo. La instrusistemo en la ŝtataj lernejoj aŭstraliaj estas preskaŭ identa kun tiu antaŭsupozata de la aŭtoro, tiel ke la tre praktikaj detaloj en la dua parto, por la preparado kaj efektivigado de instruhoroj en tia sistemo, estas vere helpaj.

Kontraste, instruisto en progresema neŝtata lernejo, aŭ eksperimentaj klasoj en ŝtatlernejoj, malmulton aŭ neniom gajnus per tiu parto de la libro, kiu estas tre rigida kaj, miaopinie, animomortiga—kun la escepto de kelkaj tre valoraj instrumaterialoj (kantotekstoj, kaj kelkaj modeloj por lingvoekzercoj). Sed aliaj instruistoj kompreneble rajtas malakordi kun mi pri tio.

La unua parto, kiu ĉefe temas pri modernaj lingvistikaj teorioj kun diskuto de ilia aplikebleco al lingvoinstruado, suferas pro multe tro da koncizeco; por ĝin valorigi, la leganto devos serĉi multan ekstran detalan eksplikadon en fakaj libroj. Ankaŭ la leganto ne ĉiam facile komprenas la celon aŭ signifon de kelkaj el la prezentaĵoj. Tio multe malpliigas ĝian valoron, kvankam ĝia enhavo ja estas relative (sed ne ĉiam!) fidinda.

Pozitiva aspekto de la enhavo de la tuta libro estas ĝia emfazo ke oni devas aktive, kaj ne nur pasive lerni. Laŭ la vortoj de la aŭtoro: "Multaj homoj ne konscias pri la granda breĉo, kiun oni devas transsalti el la ŝtupo de la klarigoj kaj kompreno al la parolo (se oni ne

nur 'reproduktas' sed ankaŭ 'produktas'). Necesas elformi la transferon inter la kono (kompetenteco) de la lingvo kaj performanco (uzo por komunikiĝi kaj esprimiĝi pense, kaj parole."

Tre salutinda kaj valora parto de la libro estas ĝia diskutado (kun multaj ekzempoj) de la "interfero" de nacilingvaĵoj, kaj elementoj en Esperanto mem (!), en la lingvo-lernado. Tiu temo bezonas multe pli vastan atenton en niaj lernolibroj kaj kursoj.

La tria parto de la libro plej malkontentigas min, ne ĉar mankas en ĝi bona materialo (efektive, enestas multaj pedagogiaj gemoj), sed ĉar tiom da neŭrologio—inkluzive de multaj diagramoj—prezentiĝas, tute sen evidenta celo kaj nenie la aŭtoro kunligas ĝin kaj la lingvo-lernadon / -uzadon / aŭ -instruadon. Krome kelkaj neŭrologiaj *teorioj* prezentiĝas erarige kiel *faktoj*, kio estas nepre evitinda en instrulibro.

Ĉu "glotodidaktiko", preciza sinonimo de "lingvoinstruado", estas utila termino. Ĉu vere helpas paroli pri la "performanco" de lernanto? Pri la valoro de tiuj kaj multaj aliaj terminoj uzataj de la aŭtoro mi ne plu komentos, krom diri ke legante la libron mi sentis ke mi malŝparas tro da tempo klopodante diveni la signifon de pseŭdosciencaj vortoj.

Tre granda kaj grava ĝeno estas ke kvankam kvarpaĝa bibliografio finas la libron, multaj el la referencoj en la teksto de la libro mem ne troviĝas en tiu bibliografio, tiel ke ili restas nur mistifikaj aŭtornomoj kaj paĝnumeroj.

Resuma takso pri la libro: boncela sed ne bone efektivigita. Sed ĉar neniu alia libro similtema haveblas en nia lingvo, supozeble pli bona ol nenio. Mi bedaŭras ne povi pli alte laŭdi ĝin. ❑



DIVERSAJOJ



- ***Bonvolu korekti en la** Adresaro:* Sur p.2 en la listo de Komisionoj, la UEA-komitatano estas Kep Enderby (2 Phoebe St, Balmain NSW 2041), ne L. Scott. Sur la sama paĝo, en la komisiono pri ekzamenoj devas aperi ankaŭ la nomo de Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014. Sur p.14 elstreku la nomon Barbara Cunningham. Sur p.17: La kasisto de la Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo estas Indrani Beharry-Lall, 1/20 Fletcher St, Woodville North SA 5012; ☎ 268 4021. La prezidanto de la Manly Esperanto Club estas Prof. R.G. Robertson (ne Robinson).
- Ronald Cecil Gates, nia talenta membro en Armidale NSW, kies krimromano *La Septaga Murdenigmo* vaste koniĝas, estas la aŭtoro de nova detektivromano *Kolera Afero*, eldonita en 1993 de la Flandra Esperanto-Ligo. Ok aliaj romanoj liaj atendas eldoniĝon! Dume li

verkas plian, *Mortiga Ekspreso*, kaj planas...

- Kaj *Vinilkosmo* planas produkti muzikan kompilaĵon sur kasedo kaj kompakta disko kun dekkvino da kantoj de diversaj kantistoj, laŭ numero 6 de *Rok-Gazet'*

MARY COOPER

19 novembro 1906—22 julio 1994

verkis Masterton Esperanto-Klubo

Forpasis la 22an de julio fidela anino de Masterton Esperanto-Klubo kaj NZEA. Mary komencis lerni Esperanton post sia emeritiĝo kiel flegistino kaj entuziasme ĉeestis laŭeble ĉiun kongreson kaj en Nov-Zelando kaj eksterlande. Ĉiu kiu ĉeestis kongresojn en Masterton memoras ke ŝi estis la spertulino kun la tekruĉo. Mary estis vera Esperantistino ĉar ŝi kredis ke paroli kun enloĝantoj estas la plej grava kialo por vojaĝado.

***

Kun granda bedaŭro ni anoncas la morton de Dorothy Harry, edzino de Ralph Harry.

***

Refoje Krimnoveloj Sep
de Ronald Cecil Gates.
Eldonis Libroservo de AEA, 1994. 90p. Prezo en Aŭstralio kaj Nov-Zelando AŬ$8.00. Profitu ĉi tiun novan eldonaĵon kaj donacu al vi mem kaj al viaj eksterlandaj amikoj, por ke ankaŭ ili konu ĉi tiun rapide famiĝantan aŭstrali - esperantistan aŭtoron.

- Du Esperanto-kursoj sur komputilaj diskoj: Macintosh-uzantoj povas ricevi senpage de David Poulson, 6 Barlee Place, Edgewater WA 6027 reviziitajn formojn de du Esperanto-kursoj preparitajn de Michael Urban. Por detaloj bonvolu skribi al David Poulson.



La Esperanto-Federacio de Kvinslando invitas vin al

La 31-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

ĉe The Southport School, Southport
30 junio - 7 julio 1995

TRE GRAVA NOVA VORTARO

La *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (*CEED*) de Peter J. Benson eldoniĝas. Prezo inkl. poŝtkostojn se oni mendos antaŭ 1 oktobro: Bindita ekzemplero, US$26.95; broŝurita ekzemplero, US$19.95. Adreso: ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono.

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vic-Prezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.

Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AŬ$30 por individuo, klubo, kc, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ 096 46 1389.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ 9-817 8244.

Sekretario: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 9-270 3669.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $40 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas ekon.-aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton per UEA; aŭ pagi en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto **aeal-w**, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA. Oni povas mendi rekte de la Libroservo de AEA pagante per 34 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj Aŭ$40; sendu rekte al la Libroservo de AEA. En Usono *ESK* mendeblas ĉe ELNA, prezo US$30.00.

Bonvolu informi la redaktoron: D-ro Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio, se via nomo aŭ adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1994 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1994 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita. Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh Classic II kun Sistemo 7.1, uzante Microsoft Word 5.1; kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0.

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.